



Informoj:
Arto -- Literaturo
Turismo -- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"
INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS



Aragonanaj vestitaj per aragonaj kostumoj

NAŬA DE JULIO




1908—1933

“FRATECO”

ESPERANTA SOCIETO




ZARAGOZA

el[^]donis tiun ĉi eksterordinaran numeron
kiel rememoro pri la XXV.^a datreveno
de ĝia starigo





Turo de la Quinta Julieta
sur kiu flirtis la verda standardo
en la tago en kiu ni solenigis
nian XXV.^{an} datrevenon.





D-ro. LAZARO
L. ZAMENHOF



Aŭtoro
de
ESPERANTO



Naskiĝis la
15.^{an} de decem-
bro de 1859.

*


Mortis la 14.^{an}
de aprilo de
1917.



TRIUMFA MARŜO

E L

RUBÉN DARÍO



*El hispana lingvo samritme
tradukis kaj kore dediĉas
al Frateco en la XXV.^a
datreveno de ĝia starigo.*

Vicente Inglada.

Jam venas venkintoj!
Jam venas venkintoj! Jam sonas la helaj trumpetoj.
La glav' anonciĝas per brilaj lumĵetoj:
Jam venas — or', fer — sekvantar' de l' heroaj lukintoj!

Ĝi pasas sub arkoj de blantaj Minervoj kaj Martoj garnitaj,
Sub arkoj triumfaj, ĉe kiuj stariĝas de l' Famoj la longaj trumpetoj,
La gloro solena de l' flagoj militaj,
Portitaj de manoj fortikaj de bravaj atletoj.
Aŭdiĝas tintad', kiun faras armiloj de l' gloraj rajdistoj
Kaj ankaŭ buŝaĵoj morditaj de fortaj militaj ĉevaloj,
La teren frapantaj hufŝtaloj
Kaj la tamburistoj
La takton batante laŭ ritmoj kuraĝaj;
Jen pasas la brav-militistoj,
Jen pasas sub arkoj omaĝaj

El helaj trumpetoj subite radias son sagoj,
La kanta sono,
La varma brilhaŭro
Per tondr' envolvanta el oro
Majestatan fieron de flirtaj la flagoj.

Sonoras trumpet' pri batal', venĝinklino
Malglataj kolharoj,
Pri lanc kaj pikilo, pri hirtaj tufaroj,
Pri sang' disversita—heroa karmino—
Sur tero,
Pri l' nigraj hundaroj
Pelitaj de l' Mort' por milita prospero.

La hela sono
L' alvenon atestas
Triumfan de l' Gloro;
El pinto montara, sur kiu ĝi nestas
Rapidas la bando kondora, fendanta
L' aeron sagfluge. Jen venk' alvenanta!

Jam pasas l' anaro.
Heroojn av' montras al nepa l' okulo,
Ĉirkaŭe de l' ora bukloro
Aperas neĝbarbo de la maljunulo.
La belaj virinoj florkronojn plektadas,
El sub la portikoj rozvangoj aperas:
Plej ĉarma el ili oferas
Rideton al vir', kiu plej fieradas.
Kaptinton de l' flag' malamika honoru!
Honoru vunditojn, honoru glorcelajn
De mano fremdula buĉitajn soldatojn fidelajn,
Trumpet': glorsonu!

La glavoj ŝatindaj de tempoj senmortaj
El siaj teniloj sin klinas al novaj la kronoj kaj laŭroj:
La glavoj maljunaj de la grenadistoj, ol ursoj, pli fortaj
Kaj fratoj de tiuj lancistoj, estintaj centaŭroj.

Militaj bloviloj trumpetas;
Aer' voĉoplene tremetas...


—Al glavoj maljunaj militaj,
Al gloraj armiloj meritaj,
Simboloj de famaj la agoj—
Al sun' heliganta la venkoj de nunaj la tagoj,
Al estro heroa fierajn junulojn gvidanta;
Al tiu amanta l' insignon de patra la tero,
Al kiu venkadis, armaĵe kovrita, kun glavo frapanta,
La sunon de ruĝa somero,
La neĝan blovadon de frosta vetero,
La prujnon glacian,
La nokton, malamon kaj morton, por landa honor',
Saluton elsendas trumpetoj bronz-voĉe ludantaj la himnon nacian
De l' glor'!

REMEMORO

En la dudekkvinjara rememorado de fondiĝo de esperanta societo "Frateco", unua alvoko, eble, de zaragozanoj al la granda kaj fruktiga ideo, mi, kiu estis samideano kaj humila kunlaborinto de tiuj tri memorindaj kaj laŭdindaj viroj, Sroj Montagud, Benítez kaj Gastón, dediĉas al ili mian fervoran rememoron kun kristana preĝo.

M. SANCHO IZQUIERDO.

FONDINTOJ DE FRATECO



De maldekstre dekstren: S-ro. MONTAGUD, BENÍTEZ kaj GASTÓN.

ANTAŬEN!!

*Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
Pri l' tempoj estontaj pensante,
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas
Ni semas kaj semas konstante.*

ZAMENHOF.

Tia estis la devizo de la unuaj pioniroj kiuj komencis la esperantan movadon en Zaragoza.

Ni devas iafoje halti por rigardi la trakuritan vojon kaj utiligi la sperton akiritan dum la batalo kontraŭ la renkontitaj ĉiuspecaj baroj. Multe instruas nin la studado de la pasinta tempo, ĉar la historio estas la plej bona gvidilo en nia mallonga, kavakam tre emociplena vivo.

De la plano kie Esperanto estas nun lokita ni devas turni nian atenton kaj kortuŝe memori la "trion" kiu tiel alte flirtigis la verdan standardon.

La nomoj *Agustín de Montagud*, *Rafael Benítez* kaj *Emilio Gastón* tiel forte enradikiĝis en

la cerboj kaj en la koroj de la malnovaj esperantistoj el Zaragoza, ke kiam mi memoras la jaron 1.908^a, niaj fortoj multobliĝas ĝis ne imagebla grado, por sekvi la vojon montritan de la neniam forgesebaj gvidantoj.

Malfeliĉe Sro Benítez forlasis Zaragozo'n kaŭze de profesiaj devigoj kaj Sro Montagud mortis. Anstataŭi ilin estis tute neeble.

Restis la nelacigebla pioniro Sro Gastón kaj ĉirkaŭ li grupiĝis la ne multaj tiamaĵ esperantistoj.

Ni ne silentos la gravan helpon de Sro Heliodoro Martín kiu tre ĝentile metis sian lernejon (Colegio Politécnico) je la dispono de la esperantismo.

La lernantoj alfluis multenombre en la esperantaj kursojn, sed tio ne entuziasmis nin ĉar ni perfekte komprenis ke nur venis preterpasantoj, t. e. unutagaj floroj rapide velkontaj. Malmultaj tagoj sufiĉis por pravigi nin.

Pasis la esperanto-modo kaj el la multenombra ĉernantaro, restis kelkaj fideluloj kiuj komprenis la veran rolon de la internacia lingvo.

La unua paŝo estis farita. En Zaragoza, Esperanto estis diskutata. Ĉu serioze? Ĉu moke? Ne gravas la diversaj manieroj interpreti la internacian lingvon. Por ni sufiĉis ke moke aŭ serioze oni nomus multfoje Esperanton.

En la jaro 1.908^a la tiamaj esperantistoj (mi revenas denove en la unuajn momentojn) kies apogkolonoj estis la tri ĵus nomitaj pioniroj, kuraĝis fondi la societon "Frateco" nomo kiu montras la sentojn plenigantajn la korojn de la tri fondintojn.

La ĝojo havi jam societan personecon tiel fortikigis nin ke la batalo kontraŭ la mokantoj kaj indiferentuloj estis akceptata. Diversaj faktoj silentigis la ridon de la sin nomantaj fortaj spiritoj kiuj konsideris grava afero nur tion, kio tuŝas la korpajn sentorganojn aŭ liveras ian profiton.

Malrapide iris la Esperanto movado, sed estis forta la fundamento sur kiu ni apogis nin por daŭrigi la propagandon.

La mondmilito, kiu nuligis tiom da pozitivaj valoroj, malhelpis ankaŭ la disvastigon de Esperanto ĉar la spiritoj turnis nur la atenton al tiu neniam konata okazintaĵo.

La burĝaj kaj kapitalistaj tavoloj kalkulis kaj kolektis la gajnojn atingitajn per negocoj ne ĉiam klaraj. La nepotencaj sociaj klasoj, tiuj kiuj konas nur suferojn senprofitajn, estis kaptitaj de ŝovinismo kiu ludis rolon de veneno dormiganta la verajn homajn sentojn. La homaro travivis momentojn dum kiu la plej kruela koro atingis heroan rangon. Ĉie sango, ĉie morto, ĉie detruo. Esperanto estis neatentindaĵo.

Kiam paco fariĝis kaj la homoj rigardis la freneze pasintajn jarojn, asocioj kaj organizoj fondiĝis por prediki fratigon ĉe la homoj. Esperanto revenis en sia deca posteno kaj ricevis fortan puŝon antaŭen. Ne nur oni faris la peresperantan propagandon, ankaŭ la peresperanta estis energie komencita de tutmondaj organizoj, ĉu sciencaj, ĉu laboristaj, ĉu religiaj, montrante la vivantecon de la lingvo.

Rilate al Zaragoza, mi povas konstati ke Esperanto ankaŭ progresis, sed en la jaro 1925^a ni perdis nian karan Emilio Gastón kies anstataŭanto estas ne trovebla. Tiu terura bato senkuraĝigis momente la zaragozan esperantistaron, sed baldaŭ ĉiu okupis sian posteno por ne malsukcesigi la penojn de la malaperinta santideano.

Per la kunigoj de l' fortoj de ĉiuj esperantistoj por daŭrigi la komencitan laboron kaj memorante la klopodojn de nia pioniro, Esperanto antaŭeniris kaj Frateco fiere subtenis la verdan standardon, ĉie respektatan.

Post ĉi tiu rapida rigardo malantaŭen, ni devas pensi pri la estonteco.

Sur la jam streĉitaj malnovaj esperantistoj, la entuziasmoplenaj junuloj devas fundamenti la fortikaĵon kaj el ĝi, eniri en ĉiujn organizojn, sciencajn, sociajn, ktp. por forigi la lingvan baron kiu, kune kun la aliaj antaŭjuĝoj, malhelpas la liberigon de la homaro.

La malfacilaj tempoj por Esperanto pasis sed oni ne devas ripozi ĉar longa estas ankoraŭ la traŭrota vojo.

EMILIO ARTIGAS.

KRIZA TEMPO

Mi supozas, ke la direktoro de NIA VIVO ricevis per la jubilea numero nur seriozajn verkajojn. Certe la soleneco tion postulas, kaj pro tio mi ankaŭ verkos seriozajn, eĉ malgajajn. Mi rememorigos gravan malsanon de "Frateco"; tiel grava, ke ĝi preskaŭ mortis.

Tio estis efikaĵo de la granda milito: forgesado de ĉiuj spiritaj sentoj kaj emo al produktivaj negocoj. La tuta homaro nur pensis tiam pri militaj aferoj, kaj pri riĉiĝo kiel eble plej rapida.

Ĉiu homo sin kredis Napoleono. Pli ol unu kafeja tablo suferis altrudan pugnobatan rezonadon de grandegaj hejmaj generaloj. Unuj asertis ke la germanoj havas tiel misteran kaj grandan kanonon, ke la tuta Anglujo mortos pro timo; aliaj, ke la amerikanoj ŝarĝas la acraĵajn bombojn per malmolaj dolaroj, kiuj malaperigos eĉ la ateston pri la naskiĝo de l' Kaiser'o kaj ĉiuj liaj akompanantoj. La diskutantoj preskaŭ ĉiam finis insultante sin reciproke kaj eliris el la kafejo mallbonhumore kaj nepagante al la servisto.

Tiel kolerigitaj ili estis ke al la unua renkontita konatulo ili vendis ion ajn, dek, cent aŭ miloble pli kare, ol ĝustapreze.

Mi konas naivan viron kies tuta bienaĵo antaŭ la milito konsistis el kvin gefiloj, grumblanta bopatrino, multaj ŝuldoj kaj unu kaĝo kun neurasteniano pasero; kaj post malmulte da tempo li estis riĉega, liaj gefiloj estis tiel elegantaj ke ili ludas elektrefunkciantan fortepianon, la bopatrino forlasis tiun ĉi mondon, li havis dek orajn kaĝojn kun ankaŭ oraj kaj meĥanikaj kantamaj birdoj, kaj li eltirigis ĉiujn siajn dentojn por anstataŭi ilin per aliaj platenaj. Tiu ĉi ŝanĝo ne estis mistera; li dediĉis sin al la eksportado de bastonaj pintŝirmiloj kaj de malnovaj gumaj kalkanumoj.

Sed ni reiru al "Frateco". Tiam, nia societo iom post iom alproksimiĝis al la morto. La anoj malaperadis. Preskaŭ neniu venas en nian ejon. Kiam unu, hazarde, alvenis, la saluton "bonan tagon" resonigis la malplenaj ĉambroj ripetante: "agon... agon... agon..." kvazaŭ pulmono de tuberkuloza mortanta estaĵo.

La komencita malfeliĉo daŭris kun grava perdo por "Frateco": la tre klera, tre entuziasma kaj spirita juna pioniro David Maynar iras en la tombon kun sia korpo envolvita per la flago de "Frateco", laŭ sia deziresprimo.

La morto ne haltis; ĝi forrabis de ni la plej fortan piedestalon de nia grupo; tiun, kiu per sia mono kaj esperanta lerteco ĉiam fide vivigis sian tre karan "Fratecon": nian neniam sufiĉe ploratan bonkoran S-ron Emilio Gastón, seminto de Esperanto en Zaragoza.

Tiu bato estis mortiga; La tri aŭ kvar solaj entuziasmuloj, kiuj restis rigardis unu la alian larĝokule kaj bedaŭris: Tio ĉi falas. Tio ĉi falas!! La senhomaj klubaj muroj ripetadis mallumege de tempo al tempo: "agon... agon... agon..."

Ankoraŭ alia malfeliĉo: La mastro de nia ejo komunikis al ni, ke li devas rebonigi la tutan domon; ni devas, do, forigi el ĝi. Sed kien iri? La tiama luprezo estis malalta pro la esperantemo de la mastro. Ni ne havas monon... Ni, monatojn kaj monatojn, suferadis la masonistan laboradon dezirante ke ĝi neniam estos finita; sed fine la domo akiris elegantan aspekton kaj... ni devos

pagi trioblan luprezon. Ni esploris nian kason... kaj nur trovis en ĝi ŝuldojn... ni eĉ ne povas pagi la transporton de niaj malriĉaj mebloj. La malsanulo mortas...

Oni okazigis interkonsiliĝon de kuracistoj; eksterordinaran kunsidon en kiu estis montrata la grava stato de la malsanulo.

Unu voĉo: Ne, ankoraŭ ne. Ĝi ankoraŭ spiras, ankoraŭ estas vivo, kiel estas pruvite per tiu ĉi kunsido; la mortanto vokas, kaj ni respondas...

Kaj multaj memvole plialtigis sian kotizajon. La malsanulo dankis per malgaja rideto. Ĉu tio estos sufiĉe? La morto spionas ĝin.

Ankoraŭ "Frateco" devos suferi alian gravan perdon: Mortis la bonanima pastro Vicente Lorén, kiu ĉiutage atendas en nia klubo iun alvenontan por klarigi al li Esperanto-n...

Kaj la muroj ripetadas la "bonan tagon" kun bedaŭra ĉo: "agon... agon... agon..."

Alvenis printempo. Oni okazigas grandan propagandan paroladon. La multnombra aŭskultantaro varme plaudis la oratorojn kaj venis en "Frateco" 184 novaj lernantoj.

La vangoj de la malsanulo rozkoloriĝas. Jam ne resonas la funebra voĉo, sed ridoj; jam ne estas nur du aŭ tri malgajaj mienoj sed multaj kontentecaj kaj inter ili, ĉarmantaj virinaj vizaĝoj. "Frateco" plenviva gaje ripetas al ĉiuj: Dankon, dankon. Vi savis min. Dankon, miaj gefiloj.

Akoraŭ ĝi devas elpruvi sian fortecon. Ekstera influo intencis vundi ĝin... sed anstataŭ sango, tra la truo eliras vivo, plua vivo... NIA VIVO... nia karega revueto, kies esperanta agado fierigas "Fratecon"; nia ĉies amata gazeteto bele ornamita de ĉarmaj tekstoj, kiu potence disvastiĝas, ricevante la helpon de ĉiuj fidelaj Esperantistoj kiuj mire konscias pri tio, ke por la prospero de gazeto ne estas necesaj potencaj financaj rimedoj, sed nur fervoraj moralaj subtenoj, ĉar la triumfon ne alportas la oro, sed la koro.

Kaj "Frateco" senĉese ripetadas: "Dankon al ĉiuj". "Havante tiel laboremajn gefilojn, mi, ja, neniam mortos". "Mi dankegas vian agon".

JOZEFO ORÓS.

Zaragoza, 8.^a de julio de 1933.

ĈIAM ANTAŬEN

NIA VIVO hodiaŭ aperas ornamita, plenigita per fervoraj verkaĵoj dediĉitaj al la solenigo de la 25-jara ekzistado de "Frateco". Kiu ne scias pri la sennombraj malfacilaĵoj kiuj baris ĉiutempe la klopodojn de la meritindaj apostoloj de Esperanto, ne povas kompreni plene la signifon kaj valoron de tiel longa ekzistado. Ĉio kion ni dirus por honori la fondintojn de "Frateco" estos pala esprimado de nia kora sento. Malfeliĉe, kelkaj el ili ne povas rigardadi nun la amplekson de sia iniciatita tasko; ili mortis. Ni honoru ilian memoron! "Frateco" estas nuntempe inter la esperantistaro astro kiu laboras per propra lumo. Ĝia graveco estas sufiĉe konata ĉe nia lando, kaj la ĉo de ĝia laboro estas forportata de NIA VIVO al la plej malproksimaj landoj.

Ĉu la estonteco bonaspektas por ni? Ni restus kontentaj se la tasko disvolviĝus kiel nun, ĉar nuntempe, kvankam la vojo ne estas tute libera de malgajataĵoj, ekzistas forta fluo de simpatio al nia

idealo. Sed... ŝajnas kvazaŭ kuras "ventoj de tempesto" por nia internacia lingvo. Nuntempaj okazintaĵoj konstatas ke la Mondo altigis sian kuradon, eble tro kapturniĝema, kaj, ŝajne, ĝi estas pretigonta returneniri. Denove la brilo de la armiloj ensorcās la homojn kvazaŭ sentebraj papilioj antaŭ fokusa lumo; la sonado de trumpetoj kaj tamburoj kiu antaŭ kelke da tempo malĝojigis la animon rememorinte antaŭajn malfeliĉaĵojn, denove estas aŭdata plaĉe, dum la bruo el trupirado, kvazaŭ malgaja martelado, maltrankviligas la spiriton tra la limoj de ĉiu lando, kaj ju pli la tempo pasas despli la limoj sin faras spirite maltraireblaj. Tiaj okazaĵoj influas plene je la pligrandiĝado de akraj naciismaj sentoj kiuj nepre malaperigos ĉian fluon de kunfratiĝo. Do la horizonto malbonaspektas por Esperanto, tial ke ĝia spirito estas esence internaciista kaj, kompreneble, abomeninda por la obstinaj naciistoj.

La ekzistado de "Frateco" post pasintaj malfacilaj tempoj, faras min, tamen forpeli tiel pesimistajn pensojn, kaj ankaŭ oni devas konfidi ke multe taŭgos por la neeble malantaŭenirado de Esperanto, la efektivigita laboro.

Ĝis nun, la kuraĝo estis ĉiam devizo ĉe la esperanta idealo; se la kuraĝo restas ĉe ni, meniam malaperos nia idealo, kies semo iam fruktodonos, laŭ la deziroj de niaj koroj.

F. TURRIÓN.

REMEMOROJ PRI «FRATECO»

El la esperantistaj grupoj, al kiu mi apartenis dum mia duonnomada vivo tra Hispanujo, tiu de Zaragoza estas unu el kiuj mi konservas pli karajn kaj agrablajn rememorojn.

Hodiaŭ, okaze de la 25^a datreveno de "Frateco" mi revidas kvazaŭ per kinematografia filmo mian alvenon al Zaragoza antaŭ deknaŭ jaroj (kiel rapide forpasas la tempo!), mian aliĝon al la urba klubo (nepre devo de ĉiu esperantisto), la amikojn tiam konitajn, kiujn mi ne revidis poste, sed iam mi denove manpremos, nome, sinjoroj Maynar, Luna, Larruga, Senra (nun en San Sebastián), Pérez Vidal, ktp, ktp, aliajn jam malaperintaj kiel Sinjoro Emilio Gastón kaj lia filino Elena, sinjoro Lorén, kaj aliaj, kiujn mi ne devas forgesi en la jena tago, ĉar dank' al tiuj pioniroj ni povas kolekti hodiaŭ tiel riĉan rikolton. Ankaŭ mi rememoras la ekskursojn al Quinta Julieta, al la ponto super la Gállego, k. c.


La tutmonda milito malfortigis grave la esperantistaron, sed la klubo "Frateco" eĉ dum tiuj tagoj povis subteni alte nian standardon. Kaj hodiaŭ, kiam vi vidas la konstantan progreson de mia iama klubo, mi sentas la internan kontentiĝon de tiu kiu vidas la sukceson de societo por kies evolviĝo mi laboris dum du jaroj.

FERNANDO REDONDO.

Palma de Mallorca.

Por presi tiu ĉi numero ni estis devigataj mendi preslitterojn al N. York; ili alvenis malfrue, kio devigis nin aperigi kune julian, aŭgustan kaj septembran numerojn.
Pro tio ni petas al la legantoj pardonu nin.

ESPERANTISTOJ, ĈEFAJ ORGANIZINTOJ DE LA ENTREPRENO "GASTIGADO DE AŬSTRIAJ INFANOJ EN HISPANUJO"



De maldekstre dekstren: Sro. JOSÉ CASANOVAS, de Gerona; Sro. EMILIO GASTÓN, Direktoro de la organizado en Hispanujo, Sro. JOSÉ SERRAT, de Barcelona; Sro. FRANCISCO MÁÑEZ, de Valencia; Sro. VALENTÍN ALAVEDRA, de Tarrasa; Sro. JACINTO COMELLA, de Vich.

FRATECO AMATA

Kiel maljuna mi estas!

Dudek kvin jaroj pasis de kiam mi eniris en "Frateco", esperanta zaragoza societo ĵus fondita de niaj neforgeseblaj pioniroj Montagut, Benitez kaj Gastón.

Dudek kvin jaroj! Ŝajnas malvero, kaj tamen...

Mi rememoras, kiel reve, la vivon kaj progreson de "Frateco" dum tiu kvarono de jarcento.

De la strato Coso kie ĝi loĝis kelke da tempo afable akceptata de la "Ateneo de Zaragoza", pasis, jam memstara kaj plenlibera, al modestega sed aminda etaĝeto de la strato "Libertad", kie mi klarigis jam miajn unuajn kursojn de Esperanto: de tie al gaja etaĝo de la strato "Mayor", kaj de tie al ampleksa loko de la strato Luna, de kiu konstruaĵo jam ne eliris ankoraŭ kvankam ĝia enirejo ŝanĝiĝis en strato Roda, kaj luprezo preskaŭtrioblĝis.

"Frateco" esperantigis la tutan zaragozan esperantistaron kaj ankaŭ multajn el la foranoj. "Frateco" naskis la Aragonan Esperantistan Federacion. "Frateco" organizis la nesupereblan Esperantistan Ekspozicion de la Muzea Palaco, okaze de la Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj. "Frateco" komisiite de la Nacia

Ovieta Kongreso, redaktis la Statuton, kiu, kun kelkaj detalaj ŝanĝoj, nun regas la Hispana-Esperantista-Konfederacion. Kaj "Frateco" fondis kaj starigis NIA VIVO, la sola gazeto en Hispanujo nure literatura, kies beleconvi mem, kara leganto, povas miri kiel la plej honoriganta nian Patrujon antaŭ Esperantujo.

Tion kaj multe pli faris "Frateco" per si mem, sen la helpo de hispanaj oficialaj organismoj, kaj eĉ dum la Ŝtato, certe nekonscie, helpas mone la perfidajn atakojn al "Frateco".

"Frateco", mia amata "Frateco", kiam vi festos la kvindekdan datrenon de via naskiĝo, mi espereble jam ripozos apud ĉiuj aliaj fratecanoj, veraj fratoj, nun kaj tiam mortintoj.

Sed mia amo restos kun vi.

Ĉar ĝi estas senmorta.

MANUEL MAYNAR BARNOLAS.
Presidente Honorario de "Frateco".

NIA TRE ESTIMATA KUNLABORINTO
la japana samideano Minoru Jamada, mortis la sepan de Junio. Ni tre bedaŭras tiun malfeliĉon kaj respektplene esprimas nian kondolencon al lia familio.

Gravaj entreprenoj de "Frateco" por senkulpaĵaj suferantoj de la tutmonda milito

FRATECO, tutplena de interna ideo de Esperanto, donis bonan pruvon pri ĝi, dum tiuj jaroj, el tutmonda milito de malgaja rememoro; antaŭvidis la malĝojan problemon de la militorfoj; vidis ankaŭ kiel ili bezonas la helpon kaj apogon de la bonvolaj homoj, kaj pro tio dissendis la alvokon, kies aŭtoro estas la neforgesebla fondinto de FRATECO Sro. Emilio Gastón, kaj kiun oni povas legi sekve. En ĝi oni diras: Ne malamu tiujn kiuj suferas, kiel vi, senkulpe; vi bezonas konsolon, helpon kaj konsilojn kaj ĉi tion vi trovos, ĉe ni la esperantistoj. Tiamaniere ĉi tiu skribaĵo tion certigas.

Tiu ĉi iniciativo, tiu homa frateco kaj tiu interna ideo de Esperanto, restis kiel ĝermo, ĝis kiam plene ĝi fruktodonis, tiel sukcese kaj tiel konsole kiel la afablaj legantoj poste povos legi.

"Frateco" Esperanta Societo el Zaragozo, pere de samideano, Sro. Gastón, kiam la milito estis finita, pruvis al la mondo ke tiu interna ideo estis pli ol idealo, kiu povas atingi kaj fari tion kion estis farinta kaj atinginta, laŭ oni priskribos poste.

Al la georfoj pro la milito

Nun la homoj batalas.

Vi, kiuj suferis perdon de familiano, ploru sed ne malamu.

Kiuj batalis kontraŭ viaj patroj, eble mortis kaj lasis orfojn kiujn vi devas rigardi kiel sansuferantojn.

Post la milito, la tuta homaro ploras. Dezirinde estas ke ĝi ne restu dividita de malbonaj pasioj.

Ankaŭ, en ĉiuj landoj, en via kaj en ceteraj, estas homoj, kiuj celante homan interkomprenon, etendas sian amon al la homaro tuta. Kaj tiuj homoj, la esperantistoj, volas en la nuna malĝojiga tempo sciigi vin pri sia speciala kondolencna amo al vi, la promilitaj orfoj.

Vi kreskos, kaj, dum via kreskado, eble vi bezonas amon, konsilon, helpon. Se vi ne trovos facile ilin, adresu vian peton al la esperantistaro. En ĝi vi ilin trovos.

Solena atesto pri tia promeso estas ĉi tiu skribaĵo.

Je la jaro de Kristo 1914.^a

Mi jam diris antaŭe kiel "Frateco" okupiĝis pri la orfoj de tiu milito, kiu suferigis kaj ankoraŭ suferigas en la postmilito, la homaron.

Je la jaro 1920.^a El fremdlando ekalvenas plendaj alvokoj. En "Frateco", la 25.^{an} de Januaro oni ricevis kortuŝan leteron de la "Esperanto-Societo por Stirio", datita en Graz (Aŭstrio), la 15.^{an} de la sama monato, en kiu oni pritraktas per vivaj koloroj, la mizeron kaj malsaton en kiuj estas submetitaj la aŭstriaĵaj infanoj, petante nuntempe apogon kaj gastamon.

Kiom da kompato kaj ĉagreno kaŭzis en ĉi tiu Societo la legado de tiun leteron? Sed kiamaniere "Frateco" povus helpi tiun entreprenon, se ne sufiĉis nure la deziro sed eĉ la povo?

En ordinara kunsido okazinta en "Frateco" la 4.^{an} de Februaro, estis legita la antaŭa letero kaj nenion oni decidis pri ĝi. Tamen, oni interkonsentis okazigi eksterordinaran kunvenon por pritrakti tiun proponon kiel ĝi meritis.

Kaj la 9.^{an} de Februaro, kunsidis la anaro de "Frateco" sub la prezido de samideano Sro. Eusebio Senra plenumante la ĉefajn sekvantajn decidojn: Traduki hispanlingve la antaŭe diritan leteron kies titolo estis "Ĉu ili estas kulpaj?" kaj publikigi ĝin en la ĵurnalaro.—Ricevi en la klubo "Frateco" rekte aŭ pere de siaj anoj, ĉiajn proponojn pri gastigado kaj monsubtenado de aŭstriaĵaj infanoj kaj fine, klarigi kurson de Esperanto gvidatan de la diplomita Profesoro de Esperanto Sro. Emilio Gastón por tiuj gastigontoj de stiriaĵaj geinfanoj.

La saman tagon en kiu okazis tiu grava kunveno, la Delegito de U. E. A. Sro. Manuel Maynar vizitis la Kardinalan Moŝton Ĉefepiskopon de Zaragozo por lin sciigi pri tiu afero. Sro. Kardinalo tute kortuŝita promesis helpi laŭ sia povo ĉi tiun entreprenon kaj submetis je la dispono de "Frateco" ĉiajn nutraĵajn vestajn donacojn ricevotajn en la ĉefepiskopa sekretariejo.

Ankaŭ interesas konigi ke, "Frateco", disdonis cirkulerojn en esperanta kaj hispana lingvoj, tra Hispanujo kaj fremdlando.

Estus longdaŭra kaj enuiga afero kvankam interesa, priskribi ĉiujn laboraĵojn kaj malagrablaĵojn elportitajn kaj venkitajn precipe de Sro. Gastón kaj kunlaborantoj, dum ĉi tiu entreprenon kaj pro tio ke ĉi tiu artikolo finiĝus neniam, mi nur detalos ĉefajojn.

La 4.^{an} de Majo, "Frateco" plenumis decidon, gastigi en sia Klubo aŭstrian infanmon kaj aprobis proponon de Sro. Gastón, ke ĉiu ano de "Frateco" pagu eksterordinaran kotizon por atingi tiun celon. Sro. Gastón daŭrigis klason por la gastigontoj kaj ankaŭ propagandis en urboj kaj vilaĝoj katalunaj, valenciaj kaj aragonaj kie ekzistis abundaj esperantistoj. Per tiu sencesa propagando, oni atingis ke alvenu al Hispanujo, almenaŭ 300 geinfanoj.

Tiamaniere finiĝis la unuaj preparlaboroj de "Frateco" en tiu gravega afero, kiu nekonata de multaj esperantistoj, devigas al mi diskonigi ĝin, nun kiam "Frateco", solenas la 25.^{an} datrevenon de sia fondiĝo.

Kaj nun estas, kiam vere komenciĝas la vera, la energia kaj daŭra laboro por stiria infanhelpe tial ke, laŭ peto de la Stiria Societo, oni alcentrigis la agadon en Zaragozo, kie nia neforgesebla pioniro Sro. Emilio Gastón, devis fariĝi direktoro de siaj samideanoj la ĉefaj organizantoj de aliaj urboj, Sroj. Alavedra, Casanovas, Serrat, Comellas, Máñez, Oriach, Lloréns, Camdelacreu, Belenguer kaj Aguadé, kiuj estis ĉiam helpataj de samurbaj esperantistoj.

La hispanaj esperantistoj ne volis ekskluzivigi la bonfaran agadon en siaj samideanoj, kaj kiam ili povis elmontri laboron faritan kiel firman bazon por la sukceso, ili vokis la neesperantistan bonfaremon tial, ke la farita laboro, permesis al ili peti de aŭtoritatuloj kaj eminentaj personoj helpon materialan aŭ moralan.

Tiamaniere en diversaj urboj naskiĝis Patronaroj por ĉi tiu afero, el kiuj tiu de Zaragozo konsistis el Reverendega Eminenco Juan Kardinalo Soldevila Romero, Zaragoza Ĉefepiskopo, Ekscelen-

coj generalo de la Regiono, Guberniestro, Prezidanto de la Provinca Deputitaro, Urbestro kaj aliaj personoj, kiuj starigis kiel centra Patronaro en Hispanujo, konfidante la tutan laboron al sia membro nia samideano Sro. Emilio Gastón kiu, per tiu konfido laboris kiel oni ne povas imagi, montrante tiam, kiel li sentis en sia koro la internan ideon de Esperanto kaj ankaŭ sian amon al la homaro.

Post senĉesaj laboraĵoj kaj gravaj preparaj periodoj plenaj de malagrablajoj kaj malfacilaĵoj (kiuj daŭris pli ol ses monatojn) kaj kiuj feliĉe estis venkitaj, komenciĝis la transportado kaj venigo de la aŭstriaĵoj infanoj Hispanujon.

La 10^{am} de Oktobro (1920) alvenis Barcelonon la unua transporto de infanoj. La momento de la ŝipalbordiĝo estis vere emociiga por kiuj atendis sur la kajo, kie estis reprezento de Barcelonaj Aŭtoritatoj, de kelkaj katalunaj komitatoj, Patronaro kaj skoltaj, tiu emocio estis pli profunda por la esperantistoj, kiuj, vidantaj kiel la aliaj la mizeron kaj ĝojon de tiuj infanoj kiuj kantis dum la elŝipiĝo, sin sentis krom tio, kortuŝitaj de la frazoj de nia himno, kiu, tia okaze, ĉe la infanaj buŝoj, pli ol iam ajn sin elmontris plena je la ama kaj paca senco, kiu estis ĝia inspiro, tiam realaĵo.

La 17^{am} de la sama monato, alvenis alia transporto destinita al Zaragozo, kiu estis ricevita en Barcelono samentuziasme kiel la antaŭa. Veturante de Barcelono al Zaragozo, la infanoj estis regalataj en Manresa, antaŭ la eminentuloj de la urbo, de belaj fraŭlinoj, kiuj disdonis al ili dolĉaĵojn kaj saketojn kun manĝaĵoj.

La akcepto en Zaragozo estis solena, ĉar venis en la stacidomon krom reprezentantoj de "Fraterco", de la knabskoltoj, de la Provinca Infanejo, kaj de diversaj lernejoj, multaj favoruloj al nia entrepreno kaj la gastigontaj familioj, kunigante kelkaj centoj da personoj: la aŭstriaĵoj infanoj akompanataj de fraŭlinoj el lernejo de ĉi tiu urbo kaj ankaŭ de la esperantistoj, kantis entuziasme nian himnon "La Espero" kiu estis varme aplaudita; sed ĉi tiu momento estis vere emocia, kiam la reprezentanto de "Fraterco" salutis kaj bonvenis esperantlingve al la akompananto de la stiriaĵoj infanoj. Sro. Karl Bartel, direktoro en Aŭstrio de la organizado de tiu entrepreno. Poste ili iris al Politeknika lernejo, kie donace de la Direktoro kaj aliaj malavaruoj oni delikate servis al la infanoj luksan matenmanĝon.

De Oktobro de 1920^a ĝis Aprilo de 1922^a "Fraterco" gastigis kaj zorgis malavare en nia Klubo, aŭstriaĵoj infaninon nomatan Laise Lehner, de Graz, kiu pasigis la restado en nia urbo tre relice kaj ĉiam regalita kaj amata de la fratercanoj.

De tiu dato senĉese estis alvenintaj transportoj kun infanoj destinitaj al diversaj gastigaj urboj kaj fine, la 7^{am} de Aprilo de 1921^a, alvenis al Barcelono la lasta transporto destinita al Asturias.

Oni devas konstati ke la venintaj infanoj estis bone instruitaj: ke baldaŭ sin adaptis al nova vivmaniero kaj ke ĉiuj akceptis plenkore siajn gastojn.

El 326 infanoj venintaj Hispanujon, en ne tute malbona sed tre malfortika sano kaj urĝe bezonantaj refortikiĝon, nur unu mortis en nia lando: knabino kiu escepte venis de longe malsana, kaj ne havis sufiĉan forton por pasi de infaneco al knabineco. La ceteraj mirinde pli fortiĝis kaj

dikiĝis; kelkaj el ili gajnis po 26 kilogramoj sur sia antaŭa pezo kaj por ĉiu oni povas kalkuli mezan gajnon de 18 kilogramoj.

La infanoj restadis en Hispanujo almenaŭ unu jaron kaj estis zorge atentitaj de siaj gastigantoj kaj esperantistoj.

La jaron 1922^a komencis la retransportado de la infanoj; la unua retransporto okazis feliĉe la 21^{am} de Julio kaj la lasta dum la somero de la jaro 1923^a.

Kiel kuriozaĵo mi aldonas ke Zaragoza gastigis 28 infanojn.—Aragón 8.—Gerona 17.—Olot 20.—Toroella de Montgri 20.—Bañolas 24.—Figuera 12.—Tarrasa 53.—Sabadell 23.—Vich 15.—Valencia 27.—Castellón 7.—Oviedo 26 kaj Asturias 23. Ankoraŭ restas en nia lando 29 infanoj kiuj laŭ sia deziro kaj tiu de siaj familianoj volis loĝi en Hispanujo.

Mi finas ĉi tiun artikolon pro tio ke ĝi tro plilongiĝis, sed antaŭ ĉi mi proklamas laŭte, ke ĉi tiun entreprenon, oni ŝuldas ekskluzive al Esperanto kaj al la esperantismo, kies interna idec pruelmontris, ke Esperanto tra la mondo, kondukas al la sanktharmonio promesita de nia SENTO kaj, ke la esperantistoj sentas kore Amon kaj Pacon.

JOSÉ LARRUGA.

Zaragozo, Julio 1933^a.

31.^a de Aŭgusto de 1931



IZIDORO FLORIA

INICIATINTO

DE

« N I A V I V O »

MORTIS PRO VUNDO

PREĜU POR LIA ANIMO

NI ESTU OBSTINAJ

La nunaj samideanoj forĝis la devojn de ĉiu esperantisto.

Inter la devoj, kiujn montris al ni nia neforgebla Majstro: *la espero, la obstino kaj la pacienco*, estas la dua, t. e. *la obstino*, la devo, kiun ni neniam forĝos, se ni volas esti fieraj pri nia esperantismo.

Paciencon ni havas; esperon ni tenas en nia koro, sed la obstino estas virto, kiun perdis la plimulto de la nunaj apostoloj (tiel dirite) de Esperanto, kaj se ni ne estas obstinaj, neniam ni trafos la celon de nia espero.

Ni estu obstinaj ĉiam kaj ĉie.

Memoru vi, samideanoj, la vortojn de D-ro. Zamenhof... "eĉ guto malgranda konstante frapante, traboras la monton granitan".

Kion signifas tiuj versoj?...

¡Ni estu obstinaj!

ANDRES PIÑO.

Valencia, 9-7-33.

Fratercanoj!

Parolu al viaj amikoj pri nia celo!

Dudekvina datreveno de "Frateco"

La tago 16.^a de la pasinta Julio estis granda tago por "Frateco", ĉar en tiu ĉi tago oni solenigis la dudekvinan datrevenon de nia Asocio. Ĝojega tago en kiu densiĝis la entuziasmo de la fratecanoj kaj de la zaragozaj esperantistoj, ĉar oni povas diri ke ĉiuj, eĉ la anoj de aliaj asocioj, estis faritaj esperantistoj en "Frateco". Tiel komprenis la plimulto el ili, kiuj ĉeestis por tributi sian dankon al la Asocio patrino de la zaragoza esperantistaro.

Estis deziro de la direktantaro de Frateco efektivigi literaturan feston kiu taŭgus por pliiĝi la entuziasmon de la esperantistoj kaj por disvastigi Esperanton inter la personoj fremdaj je nia ideo, sed lastahoraj malfacilaĵoj nebligis tiun ĉi feston kaj estis necese plimalgrandigi la programon.

Matene je la dekunua horo ni alkuris en la kazinon "Mercantil" kie ni estis ricevita de ĝia Prezidanto Sro. Manuel Maynar, honora Prezidanto ankaŭ de Frateco. Tie oni babiladis Esperante dum kelke da tempo kaj, kiam jam estis la unua horo, ni translokiĝis en la restoracion de "Torre-ro" kie oni servis al ni manĝadon ĉe kiu ĉeestis pli ol sesdek kunmanĝantoj. La festenon honoris per sia ĉeesto Sro. Federico Martínez, urbestro de Zaragozo.

Estis ĉe la prezidatblo Sino, Carmen Burillo, vidvino de Sro. Emilio Gastón; Sro. Federico Martínez, urbestro de Zaragozo; Sroj. Emilio Bruquetas kaj Manuel Maynar, Prezidanto efektiva kaj honora respektive de "Frateco"; Sro. José Orós, Prezidanto de la Hispana Esperantista Konfederacio kaj de la Aragona Esperantista Federacio kaj Sro. Emilio Artigas, nelaciĝebla kreanto de esperantistoj.

Post la manĝado, paroladis Sro. Bruquetas, kiu rememorigis la malfacilaĵojn tra kiuj "Frateco" estis dovigata marŝi ĝis atingi la nunan situacion, kaj petis dankecon por tiuj fratecanoj kiuj entuziasme sukcesis krei nian Alsocion kaj per malavareco savi ĝin je la malfacilaj situacioj.

Poste Sro. Federico Martínez, legis tre interesan skribaĵon, dediĉante sentimentalajn rememorojn al Sro. Emilio Gastón kaj al la tro baldaŭ perdita esperantisto Sro. David Maynar, bedaŭrante ke li mem, tiel amanta ĉiam nian ideon, ne povas nun ĉeesti je tiu ĉi festo kiel esperantisto sed nur kiel entuziasmulo de Esperanto kaj de "Frateco".

Pastro Emilio Pérez paroladis por laŭdi Esperanton rimarkigante la devizojn enhavatajn en la esperanta idealo: frateco kaj paco.

Sro. José Orós, kiel Prezidanto de la Hispana Esperantista Konfederacio kaj de la Aragona Esperantista Federacio aliĝis al la festo kaj prononis vortojn por mirigi kaj laŭdi esperantan laboron de Sro. Emilio Artigas kiu silente kaj konstante de post la fondo de "Frateco" dediĉas sian aktivecon al la lernigado de Esperanto.

Poste Sro. Emilio Artigas, emociita pro la laŭdoj al li dediĉitaj, dankis esperante kaj elmontris la entuziasmon kiun al si inspiras la idealo de frateco inter ĉiuj popoloj sen diferenco de nacioj, tute enkadrata en la esperanta ideo.

Sro. Isidoro Achón, plialtigis la progreson kiun signifas Esperanto kaj rememoris vojaĝon kiun li faris en Germanujon iomete post esti lerninta

ĝin, konvinkigante pri ĝia praktika utileco. Li rekomendis al la direktantaro de Frateco la oftan organizon de festoj por la esperantopropagando, kiuj ĉiam estas efikaj por ĝia plej rapida disvastigo.

Sro. Manuel Maynar dankis unue la rememoron dediĉitan de Sro. Federico Martínez al lia filo David kaj poste, tute emociita, diris ke la vivo estas plena de kontrastoj kaj, kiel ĉiam oni trovas la dolĉecon kun la maldolĉeco, la rozon kun la dorno, tiel je tiu ĉi okazo kunvenas en lian menson la ĝojo kaj la malgajejo kaŭzita la unua pro la festo kiu kunigas ĉiujn kaj la dua pro la rememoro de la morto de lia karega filo David, kiu okazis antaŭ dek du jaroj kaj precize hodiaŭ mem.

Ĉiuj parolintoj estis tre ovaciitaj.

Sro. José Muñoz legis tre bone verkitaĵojn aludantajn al la festo, kaj estis tre aplaŭdita.

Poste ĉiuj kunmanĝintoj translokiĝis al la "Quinta Julieta", kampodomo de la fratecano Sro. Benedicto kie oni efektivigis feston por oferdono al Sro. Artigas.

Sro. Maynar nimarkigis la meritojn de la antaŭdirita Sro., rememorante ke li estis lia lernanto kaj preskaŭ ĉiuj zaragozaj esperantistoj ricevis liajn sciencajn lecionojn; tial ĉiuj estas tute konvinkitaj pri liaj boneco kaj kapableco kiel esperanta majstro.

Sekve Sro. Maynar donacis al li albumon dediĉitan de la esperantistaro: la "Kompleta Verkaro" de Dro. Zamenhof kaj fontplumon, donacajon ankaŭ de la lernantoj kaj lernintoj de Sro. Artigas. Tiu ĉi Sro. dankis esperante la oferdonon.

Fraŭlino Puértolas kantis versojn dediĉitajn al Sro. Artigas kaj al la Asocio "Frateco".

Poste la direktantaro de "Frateco" regalis la ĉeestantojn per vespermanĝo kaj trinkaĵo. Fine la gejunuloj havis gajan dancadon.

Granda tago por Esperanto kaj por "Frateco" kiun neniam mi forgesos!

FERNANDO ETAYO.

La interna ideo de Esperanto

Por ni, tiuj kiuj vivas de longe tute kaptitaj de la "interna ideo" de Esperanto, estas fakto nedubebla, ke tiu ideo ekzistas. Potenca, morala forto gvidas sendube la klopodojn kaj oferojn de la esperantistaro, por la subteno de ilia ideala propagando, spite la kontraŭstaraj baroj, la ĉiuspecaj malfacilaĵoj, la devigaj elspezoj kaj eĉ la moko de sensecaj mallogikaj kritikemuloj.

Tamen, ĉar ekzistas kelkaj esperantistoj, kiuj esprimas la diron-eble ili ne estas tute konvinkitaj pri la pravo de tia diro, - ke ili konsideras Esperanton nur kiel lingvon, nur kiel materian komprenilon inter la homoj, ni estas devigata prezenti al vi, kara leganto, kelkajn argumentojn kaj eĉ elpruvi per faktoj, ne per vortoj, la ekziston de tia impona forto, kia estas la "interna ideo", vera kaj efika subtenilo de la esperanta movado.

En viaj manoj, ja, estas la pruvo de mia aserto. Ĉar ĉu vi ne konscias, ke tiu ĉi eksterordinara numero de NIA VIVO, kiu nun estas sub viaj okuloj, tute ne ekzistus, se ĝiaj direktantoj ne estus gvidataj de interna forto devenanta de morala homama celo? Ĉu vi ne konas la grandajn malfacilaĵojn, la bezonatan laboradon, la perdon de tempo kaj mono, kiujn petegas la publikgado de

gazeto, eĉ kiam ĝi estas modesta verketo? Tiajn oferojn, tiajn elmontrojn de malavareco kaj homamaramo neniu prezentus, se nur la materia, egoisma celo gvidus lin.

Kaj kion ni diros pri la konstanteco kaj entuziasmo por nia ideo de tiom da pioniroj en la tuta mondo, malgraŭ la multjaraj disputadoj, la gravaj situacioj forpasintaj kaj la senhalta batalado kun la malamikoj? Ĉu la reviviĝo de Esperanto post la sentmortiga eŭropa milito, ne pruvas ke nia lingvo internacia estas io pli respektinda ol ŝtona, senanima estaĵo? Sen supernacia sento pri amo al la homa progreso, ĉu povus enteni la esperanta historio internaciajn nomojn kiel Grabowsky, Bein, Cart, de Beaufront, Pollen, Bourlet, de Menil, Codorniu, Ayza, k. c., k. c.? Ĉu ekzistus nun en nia patrujo tiuj kuraĝaj samideanoj, kiuj post tridekjara batalado pro la esperanta idealo, kaj malgraŭ tute bedaŭrindaj malagrablaj okazintaĵoj, restas fidelaj al ĝi, nome S-roj Maynar, Inglada, Bremon, Grau, Piñó, Caplliure, Mangada, Mojado, Alonso, Allende, Garzón, k. t. p., k. t. p., se ili ne vivus sub la influo de la interna ideo?

Do evidenta estas la ekzisto de interna forto, kiu gvidas nin al la alta celo pretigi por la homaro lingvon interfratigan, penantan atingi pli perfektan homaron, kaj mi finas per similaj vortoj al tiuj, kiujn antaŭ kvindek jaroj esprimis nia amegata Majstro, Dro. Zamenhof: ke se ni konscius ke liaj klopodegoj por krei kaj starigi Esperanton havas nur la sekan signifon doni al la mondo novan ligvon, sen la morala esenco, kiun li volis enkonduki en ĝin, celante la perfektigon de la homaro, li tute forbruligus ĉiujn paperojn, kiuj reprezentis lian karegan verkon kaj la oferon de lia tuta vivo.

FERDINANDO SOLER VALLS.

Madrid, julio 1933.

MALMORALA RAKONTO

EL JACINTO BENAVENTE

MONOLOGO (al la publiko)

Kia malfacila situacio! Estas tagoj en kiuj viro sin sentas kapabla agi plej maltime, kaj nenio ŝajnas al li neebla. Kaj okazas ke mi estas tia; estas du vortoj kiuj ribeligas min, ekbruligas mian sangon kaj min devigas senti min kapabla al ĉio: la vorto malfacile kaj la vorto neeble. Sufiĉas ke iu diru pri io antaŭ mi: estas malfacile, estas neeble, por ke mi tuj respondu: Nenio estas malfacila, nenio estas neebla; mi faros tion; mi ĝin faros; oni diskutadas, estas vetoj... mi min vidas devigita defendi ilin... kaj jam mi estas en embaraso... Kaj la nuna estas eta. Imagu ke iu min diris hieraŭ: Ĉi kiu havas multe da simpatio de la publiko, sufiĉan influon kaj grandan babilecon, t. e. senĝenon; nu, mi vetas ke ĉi ne kuraĝos ĉin prezenti al la publiko kaj rakonti al ĝi unu rakonton... unu rakonton malmoralan, unu el tiuj rakontoj kapablaj, laŭ frazo ĉiekonata, ruĝiĝi ĝendarmon. Mi ne scias kia motivo povas ekzisti por ke la ĝendarmaro estu de la honto pli neatingebla ol alia armata institucio; sed okazas ke la ĝendarmaro kaj lingardistoj ĝuas tiun privilegion. Sed ni ne disktruigu. Ĉu malmoralan rakonton? Neeble! ekdiris kelka; jam antaŭe ni diris ke la vorto neeble havas la privilegion ekbruligi al mi la sangon. Ne estas io neebla. Kaj mi restis en

promeso rakonti la rakonton. Kaj kia rakonto! Ĝi estis balote elektita en kafejo de kelnerinoj; la kelnerinoj partoprenis la baloton kaj ilia vordono decidis la rezultaton... Kia rakonto! La kompatindaj knabinoj ĝin konis nur por la titolo, kaj la titolo erarigis ilin. (Ĝi ne estas la unua por ili erarigi titolo). Ĝi estas titolo tiel ĉasta... ĝi ŝajnas de infana rakonto... sed, jes, bona estas la rakonteto... Ja vi pridiros al mi; ĝia sola rememoro ruĝigas min... Sed nenio estas neebla. Malfacila, jes; kontraŭvole mi devas konfesi ke estas io malfacila, kaj la nuna estas unu el la malfacilaj aferoj. Ja ni scias ke vi certe kredas ke mi ne kuraĝas rakonti la rakonton; tial vi estas tiel trankvilaj kaj sidantaj, ne pretiĝinte foriri el la teatro, ĉirinte al mi ion... Sed, vi ne min konas. Vi ne scias kiel la vorto neeble ekscitas miajn nervojn: ĉiuj orangfloroj el la mondo ne sufiĉas por trankviligi ilin, same kiel ĉiuj orangfloroj el la mondo ne sufiĉas por doni al mia rakonto ĉastan aspekton. Mi rimarkas ke vi ekseriozigas; vi ektimas ke mi estu kapabla al ĉio. Trankviliĝu; mi rakontos la rakonton, ne pridubu; sed mia veto ne nur estas rakonti ĝin, sed ankaŭ ke vi ĝin aŭskultas; ĉar, ja, rakonti en izoleco ne estus malfacile, kaj mi jam diris ke la vorto malfacile min incitegas tiom kiom la vorto neeble.

Por ke vi min aŭskultu, mi devas rakonti la rakonton iamaniere... Tio estas la malfacilaĵo; sed ne la neeblaĵo. Mi rimarkas ke vi jam estas trankvilaj; eble vi pensas ke, resume, la rakonto havos nenion rimarkindan... Ha! La rakonto estas timinda; kapabla ruĝigi (malplaĉegas min la ĉiekonataj frazoj) kapabla ruĝigi sidordigiston de l' Nunaja Salono. Kiel rakonti ĝin evitante ke la aŭdantinoj amase stariĝu (por foriri) kaj ke la sinjoroj, pro ĝentileco, ne sin kreu devigitaj akompani ilin... kaj ke mi restu sola, sola antaŭ la sidordigistoj, kiuj ne estus tiel strangaj al ruĝiĝo kiel tiuj de la nomita Salono, kutimitaj al gajaj dancoj kun ĉiuj iliaj detaloj? Nu; mi rakontos la rakonton, kaj mi ĝin rakontos tiel ke nur de vi dependos la malmoraleco. Se vi kondutos dece, se vi scios protesti je la oportuna momento, la malmoraleco estos malaperinta kvazaŭ magie kaj iu ajn novelo de la ROZKOLORA Biblioteko estos Bokaĉa rakonto kompare al la nia... Kaj jen la rakonto.

Estis geedza paro, konsistanta, kiel la pli granda nombro el la geedzaj paroj, el unu edzino, unu edzo kaj unu... (jam vi antaŭpensas suspekto; ja mi diris ke de vi dependas ĉio). El unu edzino, unu edzo kaj unu infano malmultmonata, tre malmultmonata. Kiel en ĉiuj tiaj paroj, la edzino tute ne amis la edzon... Ĉu vi kredas tiun ĉi certigon tro ĝenerala? Nu; mi subtenas kaj rejesas ĝin. Ĉu vi volas pruvon?... En tiu ĉi momento mi estas certa pri tio ke min aŭskultas sennombre da edzinoj... Se estas unu, unu, kiu amas sian edzon, mi petegas sin ke ŝi stariĝu kaj ke ŝi diru tre laŭte tion: Mi amas mian edzon. (Paŭzo). Ĉu vi vidas? Nek unu! Ja mi diris al vi ke de via sintenado dependus la malmoraleco de la rakonto. Ĉu povas esti io pli malmorala ol ne trovi en amaso da edzinoj eĉ unu kiu amas sian edzon? Mi gajnis mian veton. Kaj mi estas nun kiu foriras indignigite.

El hispana lingvo tradukis,

† EMILIO GASTON.

Januaron de 1912.


S-ro Emilio Artigas

Jen la modesto, boneco kaj laboremo personigitaj en eta korpo, tiel malgranda ke ĝi nur havas la nepre necesan materion por reteni en tiu ĉi mondo lian grandan spiriton kiu igas feliĉa ĉiun kiu lin konas aŭ kun li rilatas.

Kaj ankoraŭ pli merita estas lia senlima boneco se ni konsideras ke li en la vivo renkontis nur ĉagrenojn, malsanojn kiuj ekde la infanaĝo preskaŭ senutiligis siajn membrojn kaŭzante al li konstantajn dolorojn kaj en pasinta tempo eĉ koleron kaj persekutojn ĉiuspecajn kiuj maldolĉigis lian vivon por li tiel malfacilan ĉar li estis devigata gajni siajn vivrimedojn per malmola kaj laciga laboro de la mateno ĝis la nokto. Kaj tamen lia vizâgo ĉiam estas ridetema, lia sinteno ĉiam aminda kaj por ĉiu kaj por ĉio li havas senkulpigon. Li loĝas en ĉi tiu mondo sed vivas en alia pli alta...

Kaj tiel granda animo nepre devis esti elkora esperantisto ĉirkaŭprenanta entuziasme la internan ideon.

Demandite de ni kiamaniere li venis al nia tendaro li diris ke aŭdinte pri lingvo komuna al ĉiuj kaj logite de l' ideo en ĝi entenata li ian tagon, antaŭ 25 jaroj, aliris lokon kie (laŭ oni diris al li) kunvenis kelkaj esperantitaj sinjoroj kiuj lin akceptis plej ĝentile.



Ke post malmulte da tagoj, kiam li jam konis la gramatikan meĥanisman—S-ro Artigas estas nacia instruisto — malfermiĝis kurso direktata de du personoj: li, kiu klarigadis la gramatikan parton kaj alia sinjoro, antaŭ kelkaj jaroj malaperinta, kiu lerginis vortojn al la kursanoj. Tio lasta estis vortara laboro kiun sinjoro Artigas estante ĵusa lernanto ne povis ankoraŭ plenumi.

Kaj de post tiam tuj post la fino de sia profesia laboro, ĉiuvespere je la 8.^a venas de malproksima urboparto al Frateco por klarigi sian Esperantoklason tiu korpo kiu per iomete kontraŭstari sian organisman malfortecon apogas sin sur bastono, kiu tamen kelkafoje neeviteble falis teren kvazaŭ moko de la malmola vivo al la honrama laboro kiun li efektivas.

Kaj ju pli malvarma estas la vespero, ju pli malfaciligas la pluvo lian doloran marŝadon, des pli ridetanta li eniras nian Fratecon kaj des pli amike li donas al ĉiuj sian maldekstran manon per

kies kontakto sentigas io eksterordinara, tute nedifinebla...

Esperanto—diras nia majstro—estas mia granda amo. La esperantistoj estas la solaj kiuj en ĉi tiu mondo donis al mi la plej intensajn kontentigojn, kie mi trovis sinceran kaj lojalan amikecon. Mi nur povas pagi al ili amante ilin plej kiel eble.

Antaŭ longe Frateco volis evidentigi sian dankemon al li, sed tio tute ne estis facila; la ekstrema modesteco de S-ro Artigas malhelpis ĉiun eksterigon de tiaj niaj sentoj sed ni ne povis preterlasi la datrevenon de la fondo de Frateco, kies plej forta apogo li estas, sen tio ke ni faru al li oferdonon kvankam certaj ke tio lin ĝenos. Sed ja ni scias ke li nin pardonos komprenante ke ankaŭ la grandaj amoj naskas profundajn ĉagrenojn.

JOZEFO MARTINEZ.

MALNOVA KASTILJANO

(EL MARIANO DE LARRA «FÍGARO»)

Jam en mia aĝo, malofte mi ŝatas ŝanĝi la ordon, en mia vivmaniero de longatempo starigita, kaj mi fundamentas tiun malŝaton sur tio ke mi ne forlasis mian hejmon eĉ unu tage por rompi mian sistemon, kiam la plej sincera pento ne sekvis la malaperigon de miaj trompigitaj esperoj. Restaĵo, tamen de la antikva ceremoniaro, adoptita de niaj gepatroj por ilia socia vivo, min devigas akcepti iajn invitojn, kies rifuzo ŝajnus krudeco aŭ almenaŭ ridinda afekto de ĝentileco.

Mi vagadis, antaŭ kelkaj tagoj, tra tiuj stratoj por serĉi materialojn por miaj artikoloj. Absorbataj en miaj pensoj, mi surprizis min mem ridante, kiel malfeliĉa homo, pri miaj propraj ideoj kaj meĥanike movante la lipojn, kelka faŭto rememoris al mi ke por iradi sur la Madrida pavimo ne estas plej bona cirkonstanco esti poeto aŭ filozofo; pli ol unu malbonintencita rideto, pli ol unu gesto de miro de la apud mi preterpasantoj, min pripensis pri tio, ke la monologoj oni ne devas fari publike; kaj ne malmultaj kontraŭpuŝoj eĉ la stratanguloj kontraŭ tiuj, kiuj turnis tiel distre kaj rapide kiel mi, min konigis pri tio ke distremuloj ne partoprenas en la nombro de la elastaj korpoj kaj eĉ ankoraŭ malmulte en tiu de la gloraj kaj netuŝeblaj. En tia spirita situacio, kian sensacion ne devus al mi kaŭzi terura frapo, kiun granda mano, gluita (laŭ tiam mi komprenis) al grandega brako venis elŝarĝi sur unu el miaj ŝultroj, kiuj, bedaŭrinde havas neniun punkton de simileco al tiuj de Atlanto?

Ĉar mi ne volis komprenigi ke mi malkonis tiun energian anoncmanieron nek maldanki la komplezon de tiu, kiu sendube pensus fari tion al mi, pli ol mesgrandan, min kripligante por la tuta tago, mi nur intencis min turni por koni kiu estas tiom amika por tiel malbone konduti al mi; sed mia malnova kastiljano estas viro, kiu, kiam li estas ema al spritaĵoj, neniun forgesas en la inkujo. Kiel dirus la leganto ke li daŭrigis pruvante al mi konfidon kaj amon? Li devis la manojn al miaj okuloj kaj min tenante je malantaŭe “kiu mi estas?” li kriis grandĝoje pro la bona sukceso de sia dolikata petolo—Kiu mi estas?—“Besto” mi preskaŭ ekrespondis; sed mi rememoris subite kiu li povus esti, kaj anstataŭante egalajn kvantojn:

“Braŭlio vi estas” mi diris. Min aŭdinte, li ellasas la manojn, ridas, premas siajn flankojn, bruple-nigas la straton kaj metas nin, la ambaŭ en scenon. “Bone, mia amiko! Nu, per kio vi konis min?”—Kiu povus esti se ne vi?...—Ĉu vi jam venis el via Viskajlando?—Ne Braŭlio, mi ne venis. Ĉiam la sama karaktero. Kion vi volas? Tia estas la demando de la Hispano kiel multe mi plezuris, ke vi estas tie ĉi. Ĉu vi konas ke morgaŭ estas mia nomfesto?—Mi deziras al vi tre feliĉan tagon—Lasu la komplimentojn inter ni; vi jam scias ke mi estas sincera kaj malnova kastiljano, la pano, pano kaj la vino, vino; tial mi postulas de vi, ke vi ne iru min gratuli, sed vi estas invitata—Por kio?—Por manĝi kun mi.—Tio estas neebla.—Ne estas rimedo.—Mi ne povas, mi reas tremante.—Ĉu vi ne povas?—Dankon.—Dankon?—Iru promeni, mia amiko, ĉar mi ne estas la Duko F. nek la Grafo P. Kiu kontraŭstaras tiaspecan surprizon? Kiu volas ŝajni vantema? Ne estas tio sed ke...—Nu, se tio ne estas, li interrompas al mi, mi atendas vin je la dua posttagmeze; ĉe mi oni tagmanĝas hispanmore; frue. Mi havas multe da homoj: ni havas la faman X. kiu improvizos por ni belege; T. kantos, postmanĝe “Rondeña” per sia de naska gracieco; kaj vespere J. kantos kaj ludos ian muzikaĵon. Tio konsolis min iom, kaj estis necese cedi; unu malbonan tagon, mi diris al mi mem iu ajn pasigas; en tiu mondo por konservi amikojn necesas havi la kuraĝon elporti iliajn ĝentilajojn. “Vi ne mankos” mi diris per senforta voĉo kaj falinta kuraĝo, kiel la vulpo, kiu vane dismoviĝas en la kaptilo, kie ĝi lasis ke oni ĝin kaptu. “Nu, ĝis morgaŭ” kaj li donis al mi mandorsan frapon kiel adiaŭon. Mi vidis lin foriri tiel, kiel terkultaristo vidas malproksimiĝi hajlnubon el sia grenkampo, kaj mi restis cerbumante kiel oni povus kompreni tiajn amikecojn, tiel malamikaj kaj malbonŝancaj.

Jam la leganto estas koninta, se li estas tiel sagaca kiel mi imagas, ke mia amiko Braŭlio multe distancas aparteni al tio kion oni nomas “granda mondo” kaj “bonnuanca societo”; sed li ne estas malaltranga homo, ĉar li estas oficisto de dua klaso, kiu enkalkulas, inter sia salajro kaj siaj bienoj kvardek mil realan renton, kiu havas rubandeton ĉe la butontruo kaj kruceton sub la koluma ombro: ke fine, li estas persono kies klaso, familio kaj komforto neniel kontraŭestaras ke li havu pli elektitan edukitecon kaj pli dolĉajn kaj ekmontremajn manierojn. Sed la vanteco lin surprizis per tio, kio surprizis preskaŭ ĉiam la tutan, aŭ plej grandan parton de nia mezklaso kaj la tutan popolklason nian. Tia estas lia patrujamo, ke li donos ĉiujn belajojn de fremdlando kontraŭ celo de sia lando. Tiu blindeco lin devigas adopti ĉiun respondecon de tiel ne konsidera amo; samtempe ke li defendas ke ne estas vinoj kiel la hispanaj, pri kio li eble pravus, li defendas ke ne estas edukiteco kiel la hispana, pri kio li eble malpravus; por defendi ke la Madrida ĉielo estas helega, li defendas ke niaj “Manolas” estas la plej ĉarmaj inter ĉiuj la virinoj; li estas homo, fine, kiu vivas per ekskluzivoj, al kiu okazas, pli malpli, kiel al parencino mia, kiu sopirmortas al ĝiboj, nur ĉar ŝi havis amaton kiu portis sufiĉe videblan elkreskon sur la ambaŭ ŝultroj.

Alvenis la dua horo kaj, ĉar mi jam bone konis mian Braŭlion, mi ne kredis konvene min tro orna-

mi por iri tagmanĝi; mi estas certa ke li ofendetiĝus; mi tamen ne volis preterigi koloran frakon kaj blankan naztukon, afero neŝparebla en nomfesta tago en tiaj hejmoj; mi vestis min tiel multe malrapide kiel mi povis same ol konfesas apud la eŝafodo la malfeliĉa ekzcutoto, kiu volus havi cent pekojn pliajn por rakonti, por gajni tempon; mi estis vokata al dua horo kaj mi eniris en la salonon je la dua kaj duono.

Mi ne volas paroli pri la senfinaj ceremoniaj vizitantoj kiuj je la horo tagmanĝa eniris kaj eliris tiun domon, inter kiuj ne estisolestimindaj ĉiuj la oficistoj de lia oficejo kun iliaj edzinoj kaj iliaj infanoj, kaj iliaj manteloj, kaj iliaj pluvombreloj, kaj iliaj kauĉukaj ŝuoj kaj iliaj pudeloj; mi preterlasas la stultajn komplimentaĵojn kiuj ili diris al la nomfesta sinjoro; mi ne parolas pri la senmezura cirklo per kiu bonderis la salonon la ĉeesto de tiom da heterogenaj personoj, kiuj parolis pri tio ke la vetero baldaŭ ŝanĝos, kaj pri tio ke dum vintro estas ordinare pli malvarme ol dum somero. Ni venu en la aferon: sonis la kvara kaj ni trovis nin solaj la invitantoj. Malfeliĉe por mi, Sinjoro X, kiu devis tiom multe nin amuzi, bona konanto de tiaspecaj invitoj, havis la lertecon malsaniĝi tiun matenon mem; la fama T. estis oportune kompromisata en alia invito; kaj la fraŭlino kiu devis tiel bele kanti kaj ludi estis raŭka en tia stato ke ŝi mem miris ke oni komprenis al ŝi eĉ vorton, kaj havis tubereton en fingro. Kiom da forigitaj esperoj!

“Supozite ke ni estas ĉiuj la manĝontoj, ekkriis Sro Braŭlio, ni iru al la tablo, mia kara.—Atendu momenton, al li diris lia edzino, preskaŭ ĉe la orelo, pro tiom da vizitoj, mi mankis dum kelkaj momentoj al tie interne kaj...—Bone sed atentu ke jam estas la kvara...—Tuj ni manĝos”... Estis la kvina kiam ni sidis ĉe la tablo.

“Gesinjoroj, diris la gastiganto vidante ke ni ŝancelas pri niaj koncernaj lokoj; mi postulas plej grandan malkaŝemon; ĉe mi oni ne uzas komplimentojn. Ho, Figaro, mi volas ke vi estu tute senĝena; vi estas poeto kaj plie, tiuj gesinjoroj, kiuj ja konas niajn intimajn rilatojn, ne ofendiĝos se mi vin preferas; demetu la frakon por ke vi ne ĝin makulu.—Kiel mi ĝin makulos? mi respondis, mordetante miajn lipojn.—Ne gravas, mi al vi donos unu el miaj jakoj, mi bedaŭras ke ne estas sufiĉaj por ĉiuj.—Ne necesas.—Ph! jes, jes, mia jako! Prenu, rigardu ĝin, ĝi estos al vi iom vasta.—Sed Braŭlio...—Ne estas rimedo, ne atendu pri etiketaĵoj”. Kaj tiam, li mem demetigas mian frakon “velis nolis”, kaj mi restas volvita en ampleksa strekita jako el kiu mi nur elmontris la piedojn kaj la kapon, kaj kies manikoj ne permesas kredible, ke mi manĝos. Mi dankis lin; ĉar vere la homo kredis fari al mi favoron.

La tagojn kiam mia amiko ne havas gastojn, li rezignas per malalta tablo, iom pli ol ŝuista benke-to, ĉar li kaj lia edzino, kiel li diras: Por kio ili deziras plie? El tia tableto kaj same kiel oni ŝprucigas akvon el puto, li suprenigas manĝaĵon ĝis buŝo, kien ĝi gutante post longa vojaĝo; ĉar pensi ke tiaj gentoj devas havi regulan tablon kaj esti komfortaj ĉiujn tagojn de la jaro, estas pensi ja ne necesajo. Oni komprenas, do, ke la pretigo de granda bankedtablo estas en tiu domo okazintaĵo, tiel, ke oni pensis kapabla ĉehavi dekkvar personojn kiuj

ni estis tablo kie apenaŭ povus manĝi komforte ok. Ni devis sidigi duonfilanke, kvazaŭ kiu iras apudmeti ŝultron al la manĝaĵojn, kaj la kubutoj de la gastoj komencis intimajn rilatojn reciproke kun la plej frata interkompreno de la mondo. Oni metis min, kiel granda honorigo inter kvinjara infano grimpanta sur plurajn litkusenojn kiujn oni devis rektigi ĉiumomente ĉar ilin flankenpuŝis la natura petolo de mia juna apudestanto, kaj inter unu el tiuj viroj kiuj okupas en la mondo la spacon kaj la lokon de tri, kies dikeco eliradis ĉie el la nura seĝo sur kiu li sidis, ni diru tiel, kiel sur kudrilpinto. Oni defaldis silente la buŝtukojn, vere novaj, ĉar ankaŭ ili ne estis ĉiutagaj mebloj, kaj ili estis suprenlevataj de tiuj bonaj sinjoroj al la botontruoj de iliaj frakoj, kvazaŭ mezaj korpoj inter la saŭcoj kaj la kolumoj.

(Daŭrigota).

Pamplona.

El hispana lingvo tradukis,

AMALIA NUÑEZ.

† S-ino Carmen Burillo, Vda. de Gastón

Kiam tiu ĉi numero estas en presmaŝino alvenas al ni la malgaja sciigo pri la morto de S-ino Carmen Burillo, kiu estis edzino de la neforgesebla fondinto de "Frateco" S-ro Emilio Gastón, jam bedaŭrinde malaperinta.

Kiam ni solenigis nian XXV^{an} datrevenon ŝi ĉeestis en festeno kune kun siaj tri gefiloj. Ni ne povis imagi tiam la tiel baldaŭan malaperon de tiu S-ino, kiu donis verajn pruvojn de amo al nia Societo.

La novaĵo estis tia, ke ĝi tute kortuŝegis nin.

Al ŝiaj gefiloj kaj familianoj ni esprimas, je la nomo de la tuta anaro de "Frateco", nian plej koran kondolenkon.

Ŝi ripozu pace!

MALNOVAJ PAGOJ

M A T E N O

(EL J. L. RONEBERG.)

Suno ian guton oran
Orienten jetis jam.
Pluis foliaĵon floran
Perla roso kaj balzam'.

Ĉiuj birdoj petolante
En l' arbaro flugas. Jen!
Mil kantetoj forsonante
Renaskiĝas je maten'.

Sur la lago mil ondetoj.
Verdan laŭbon movas vent'.
Viv',odoro de rozetoj
Miksas sin en la moment'.

Fore nubo kaj nebulo
Kaj doloro kaj murmur'.
Tago amas, mem junulo,
Sentojn de junulo nur.

Ĉio ĝojo kaj plezuro
Ĉia zorgo pasis for;
Nun mateno de l' naturo,
Nun mateno de la kor'.

OTTO ZEIDLITZ.

Eltirita el «Esperantisto», n-ro 41, Majo 1893.

Esperantistoj! Fratecanoj!
Vi devas peni por atingi novan anon por
ke Frateco estu fortega!

NOVAJ HEBRIDOJ

ĈE KANIBALOJ

(Daŭrigo)

Post eliro tra la kreskajaro iras al la loko de la oferbuĉado. En trunko de giganta bananarbo estas la ŝtono, sur kiu oni ofertas la diajn porkojn; la porkojn, kiuj havas kurbajn, eburajn ŝirdentojn. Tie ĉi, oni diras al mi, jam ne estas plu farata homajn mortoferojn: tre eble por la ĉeesto de pastro Godefroy; sed, se la viroj, kiujn ni ĉirkaŭas, kaptus blankulon meze de la arbaro, ili ne tiel respekte agus kaj certe ceremonie rostus lin.

La vivantaj oferaĵoj estas firme ligataj al palisoj ĉirkaŭ la ŝtono. La estro supreniras sur ĝin kaj alparolas la genton. La helpantoj komencas tuj hejti la ŝtonojn, kiuj konsistigos la kanakan fornon. Dume la ceremoniaj dancoj, la akrebestaj krioj, la basaj kaj longaj tamtam'frapoj senĉese estas aŭdeblaj. Kiam la forno jam estas preta, la estro malsupreniras kaj faligas la viktimojn per bastonega bato. Tuj oni ilin malplenigas je ilia intestaro kaj sen dispecigo oni preparas ilin por esti bakataj dum kelkaj horoj en forno havita en tero. Kelkaj esploristoj ne multe sciantaj pri kuirartaj detaloj disvastigis la kredon pri tio ke la kanibaloj laŭlonge trapikas siajn viktimojn kaj flamrostaras ilin. Tie ĉi almenaŭ tio ĉi ne okazas. Ili estas bakataj en forno kaj per malrapide efikanta varmo. Tiu ĉi estas ja grava detalo kaj certe la delikataj pri manĝado personoj kaj la hejmastrinoj komprenas min.

Super la oferŝtono vicoj de porkaj ŝirdentoj ligitaj per arbofibroj atestas la grandan nombron da gloraj festoj kaj riĉecon de la gento.

Ni forlasis la oferejon kaj alvenis en la placon, kie estas la tamtamoj. Ĉi tiuj estas longaj, lignaj sonoriloj faritaj el malplenigita arbotrunko tri aŭ kvar metrojn longaj kaj kun homaj skulptaĵoj. Ili estas metitaj laŭvice kaj pendas per strangaj aranĝoj; tiuj... «sonoriloj» faras misteran bruon nefacile priskribeblan. Ofte inter ili sur alta paliso estas ligne skulptita, teruraspekta birdo kun etenditaj flugiloj.

Iom post iom venas nokto. Post kelkaj minutoj mallumo regos ĉie. Por ke la dekoracio estu eĉ plej impona, granda vesperto nomata «paniko» flugas peze super niaj kapoj. Indiĝeno ĝin faligas per bastonbato, mortigas ĝin sur tero kaj ĝin montras trapikitan ĉe sia bastonpinto. Paniko estas kvazaŭ vulpo kun flugiloj kaj virinmamoj. Ĉia ino dumfluge kunportas sian idon alkroĉitan sur ĝia brusto. La vespera duonlumo malhelpas al mi fotografi ĝin.

Fine ni alvenas ĉe la marbordon. La trunkarboj aspektas kvazaŭ ĥinombroj. Sur iliaj pintoformaj ekstremajoj antaŭaj estas ligne skulptitaj birdoj ja strangaj. La kanibaloj rigardas, kiel ni ensipiĝas, dirante nek eĉ unu vorton, farante nek eĉ unu geston. Mi proksimiĝas al iu el ili kaj forprenas el lia grasa, bulforma hararo bambuan, fajrogravuritan kapornamajon. Per mia alia mano mi samtempe donas al li unu ŝelinton.

Niaj «knaboj» el insularo Lojaleco, kiuj venas en nia ŝipo kaj dum la tuta vizittempo estis maltrankvilaj, puŝas la motorboaton, en kiu ni jam ĉiuj dense staras. Sur la marbordo iom post iom kvazaŭ enfumiĝas la siluetoj de tiuj homoj kun rabbestaj vizaĝoj. Nur pastro Godefroy iom emocie ŝvingas adiaŭe sian manon dum la nokto sternas sian nigran vualon inter ili kaj ni.

Blankulo tre sperta pri tiuj ĉi gentoj pro sia longedaŭra loĝado ĉe ili diris al mi: «Estas neeble rilati iel ajn kun la indiĝenoj de Novaj Hebridoj, influu ilin aŭ juĝi iliajn agojn, se oni ne scias iliajn morojn pri la grandsirdentaj porkoj.

Ĉi tiuj efektive ludas ĉefan rolon ĉe Novaj Hebridoj. Ili estas vulgaraj porkoj, al kiuj oni fortiras du dentojn el la supera makzelo. Tiuj du de la malsupera rilatantaj la unuajn, ĉar ili ne trovas baron, libere kreskadas, atingas la superan dentokarnon, kurbiĝas eksteren kaj fine fariĝas ĉiuflanke de la kapo du ringoformaj ornamajoj, kiuj kelkajn fojojn konsistas el du aŭ tri rondoj.

Tiuj porkoj estas nutrataj per specialaj manĝaĵoj, kiuj ne postulas maĉadon, kaj oni englutigas al ili grandan amason da nutraĵoj por ilia antaŭbuĉa dikigo.

Ili estas buĉoferataj kaj pompe manĝataj okaze de festoj. Oni pendigas iliajn dentojn ĉirkaŭe super la oferŝtono kaj la «popinoj»-virinoj-portas ilin kvazaŭ braceletoj ĉe siaj brakoj.

La riĉeco de indiĝeno dependas de la nombro da diaj porkoj, kiujn li ofertas. Tiamaniere li atingas rangon, honorojn kaj virinojn. Kiam li alvenas en la plej altan rangon ĉe sia gento, aranĝas grandan, adiaŭan festenon kaj tuj falas en plej mizeran rangon. Se triafoje li sukcesas esti ĉefulo, li jam fariĝas fakte reĝo kaj tiam li rajtas supreniri sur la oferaltaron, dekreti «tabu'ojn»-malpermesojn-deklari militon, komerci kaj... manĝi siajn regatojn.

Ne pensu, ke hommanĝado estas kaŭzata de malsato aŭ de degeneriĝinta gusto. Tute ne. Hommanĝado estas la nura cerbelmontro de tiuj malsuperaj estaĵoj. Kelkaj eĉ naŭzas homviando. Ili tamen manĝas ĝin pro venĝemo, pro rito, por privi sian superecon kaj montri sian malsaton al viktimoj kaj fine por asimili iliajn kuraĝon, inteligenton, forton, ktp.

Ĉe Novaj Hebridoj la kanibaloj povas daŭrigi sen iu ajn kontraŭstaro siajn sovaĝajn morojn. Nur en tre maloftaj okazoj, kiam ili atakas kolonianon, oni persekutas ilin. Tiam la nura, franca militŝipo, kiu krozas en Oceanio, iras al la insulo por pafi kontraŭ ĝi unu aŭ du kanonkuglojn, kiuj detruas kelkajn banan' aŭ ananasarbojn kaj oni faras neniom plu.

Ĝenerale ĉe Eŭropo oni ne scias, ke ekzistas tiuj nekonataj, kanibalaj gentoj, kiuj nek estas submetitaj nek iun ajn priokupas. Finfine tio tute ne gravas kaj plej konvene estas lasi ilin trankvilaj kaj ke ili formanĝu sin reciproke, se tiu estas ilia volo.

Ĉe insulo Sankto, kiam ĉefulo mortas, liaj sep aŭ ok edzinoj sin kolpendigas sen bedaŭro nek

protesto. Iu misiisto volis foje malhelpi tiun kolektivitan memmortigon; sed ili rigardis lin mire kaj petis al li, ke li ne plu baru ilian ja naturan agon kaj ili trankvile sin mortigis.

Tradukita de
RAMÓN DE SALAS.

ESPERANTO

Tra la mondo iras io nova. Afero bela kaj, por multaj homoj, afero mistera. Iuj aŭdas pri ĝi-kaj ridetas «Ĉarma tempopasigilo por senfaruloj, ili diras: «Ni estas tro okupataj!».

Aliaj kompateme kapskuas pri kio ŝajnas al ili esti ne pli ol fatamorgano, certe finiĝonta per granda seniluziigo.—Unu mondlingvo—neebla!

Sed...

En ĉambro en agrabla holanda hejmo mi sidas kaj skribas leterojn. Multajn leterojn! Mi uzas nur unu vortaron kaj skribas ĉiujn en la sama lingvo. La jam adresitaj kovertoj kuŝas sur la tablo: Hungarujo, Germanujo, Hispanujo, Norvegujo, Ameriko mi legas sur ili.

Kaj mi pensas pri miaj geamikoj. Pri ŝa blonda norvega fraŭlino; la serioza amerikano; la juna Hispano; la vigla nigrokula Hungaro.

Kaj mi sentas la dolĉan ligilon, kiu interligas nin fortike: la ligilo de l' amikeco kaj de l' samideaneco. Unu lingvon ni havas, per kiu ni povas esprimi niajn plej altajn idealojn: Paco en la tuta mondo, amo kaj feliĉo en ĉiuj homaj koroj!—De kia raso aŭ religio ni estas, kaj kiaj abismoj estas inter ni, tio ne estas grava, en nia ligo nur amikeco kaj amo regas!

Ĉu tio estas ridinda?

... ..

Eldoniĝas gazeto. Multaj homoj, de diversaj nacioj, verkas por ĝi. Tra la tuta mondo ĝi iras, portanta la evangelion de paco kaj amo al ĉiuj popoloj.

Kaj en la sama momento ke mi, en Holando, estas leganta ĝin, eble ankaŭ ĉarma eta japanino aŭ fortika negro legas la samajn komunikojn kaj rakontojn, en la sama lingvo.

...Unu modlingvo—ĉu tio estas fatamorgano?

... ..

Gesamideanoj miaj, alte tenu ni la verdan standardon, amu kaj disvastiĝu ni nian lingvon, Esperanto, la efektiviĝo de miloj da sonĝoj kaj deziroj.

TILLY VAN HOEVEN.

Wons, Holando.

† D-ro Karolo M.^a Cortezo, mortis!!

Dum la monato Aŭgusto mortis nia eminenta samideano D-ro. Cortezo kiu per siaj gravaj ŝtataj postenoj trafis ke la Hispana Registaro fine atentu pri Esperanto kaj ĝin subvenciu.

Li estis prezidanto de Hispana Esp. Asocio, posteno kiun, pro diversaj kaŭzoj, li ellasis. Kiam tio okazis, «Fratego» petis per dokumento subskribita de pli ol ducent membroj ke li daŭrigu aŭ almenaŭ akceptu la honoran prezidantecon de tia Asocio.

«Fratego» ĉiam gardos bonegan rememoron pri D-ro. Cortezo el kiu ĝi ricevadis elpruvojn de vera amikeco.

Al lia familio, nian profundan kondolencon.

Ni humanigu la militon

Ĉiumomente mi legas kaj aŭdas la rekantaĵon, kiu aperas, kiel subskribo de tiu ĉi artikolo.

Pri tiu humanigado de la milito mi pensas multfoje kaj okazas al mi demandi min: Kia ilo estas pli humana kaj malpli dolora? (se mortiga ilo povas esti humana), ke oni dispecigu la batalantojn, per kanonaj kugloj aŭ per aksfisaj gazoj?; ke ili restu neutilaj, per pafoj aŭ per aliaj rimedoj?

Estas kredeble, ke se oni devigus la batalantojn, antaŭ ol komenci la batalon, elekti la procedon, kiun ili preferus, en okazo de vundiĝo, estas eble, ke ili preferus determinitan procedon kaj ilon; sed se oni farus la demandon, kiam ili estis vunditaj kaj suferantaj, estas ankaŭ kredeble, ke ili elektus la kontraŭan rimedon; tio estas, ke la grava afero por la suferantoj estas la vundo, ne la ilo; la doloro, ne la kaŭzo.

Tiuj diferencoj mi kredas, ke estas faritaj de la kreitaj profitoj, pere de la diplomatio; tiu ĉi defendas tiujn, kiuj timas pri la malfeliĉa konkurado de novaj procedoj kaj novaj kreotaj profitoj. Tiuj diskutadoj por konsiderigi kontraŭleĝa tiun ĉi aŭ tiun ilon, estas afero pli de tiuj ĉi kreitaj profitoj, ol de tiuj homamaj sentoj: tiuj ĉi estas la flago per kiu oni kovras tiun malbonan komercaĵon.

Mi kredas, ke se la humanizado de la milito ne estus komisiita al diplomatio, kiu ĉion ŝanĝas kaj ĉion senprave rezonas, sed oni konfidus tiun aferon al la suferantoj, la humanigo jam estus atingita per la sola, efika kaj vera procedo, kiu estas la tuta forigo de la milito.

EMILIO BRUQUETAS.
el la Rondo La Unua.

ĈASTAGO

(RAKONTETO)

Jam de longe, najbaro estis invitinta Sron Parohestron de malgranda vilaĝeto por iri ĉasi.

La pastro ne estis ema al tiu sporto, sed la najbaro ne lasis okazon por konvinki lin:—Vi vidos, sinjoro—li diris—estas tre bela tasko; vi amuziĝos multe.

La pastro donis tempon al tempo, kaj neniam decidis; la najbaro insistis ĉiam per la sama frazo:—Vi vidos kiel vi amuziĝos.

Fine, la parohestro, ne tre volonte, decidis la ekskurson por la sekvonta tago.

Je la tria matene, ili forlasis la liton kaj eliris al la kamparo; ankoraŭ estis plena nokto; la vetero estis malvarmeta kaj iom malseka; la nuboj, puŝataj de la vento pasadis rapide kaj, opiniis la pastro ke minacis la pluvo; tial li esprimis siajn timojn al kunulo, sed ĉi tiu ne kredis lin kaj respondis per la ĉiamaj vortoj:—vi amuziĝos multe.

Tri kilometrojn de la vilaĝo, kelkaj gutoj falis sur la pastran ĉapelon kaj alarmis ĝian portanto; sed la obstina najbaro ne volis aŭskulti ian rimarkon, firma je sia ideo, ripetante:—Vi vidos kiel bonan tagon ni pasigos.

Allveniente al la loko elektita por ĉasi (jam pluvetis) la najbaro ĝustelokis la pastron post granda ŝtonego, donis al li ŝarĝitan pafilon, kaj rekomendis: vi nur bezonas esti atenta; kiam preterpasos kuniklo, pafu; mi estos post alia ŝtono.

La pluvo pligrandiĝis, la malfeliĉa pastro rigardante la eble venontan besteton kaj pretigante la pafilon vidis ke la nuboj, ne la kunikloj amuzos lin.

Post du horoj, eĉ unu kuniklo preterpasis, sed la ĉasisto estis ne malseka, trempita; la akvo falis el lia vesto; li volis reiri hejmen, sed, ne kuraĝis fari tion dum ne revenis la amiko kiu en tiel malbona okazintaĵo lin metis.

Jam plentage preterpasis alia samvilaĝano kiu forpelita per la pluvo, iris hejmen; tre surprizita renkontis la malfeliĉan ĉasiston sed ne ĉasanton, tute malgaja, malvarmigata, akvokovrita.

—Ĉu, en tia tago ĉasisto?—li diris—kaj, kion mi vidas?, ĉu, la sinjoro parohestro?

—Jes, mi estas — respondis mallaŭte la akvo-plena.

—Sed, kion vi faras tie?

—Mi ne bone scias... sinjoro Nemesio diras ke mi amuziĝas multe...

P. BESCOS,

Huesca.

EKSTERLANDAJ PAĜOJ

SALUTON!...

Estas belega tago printempa. La posttagmeza suno pentras la tutan ĉirkaŭaĵon orkolora per siaj sunradioj. Ĉio aspektas dimanĉa, solena. Sur la apuda arbo kantas najtingalo kaj ĝia voĉo estas tiom bela, agraba... Antaŭ mi aperas kampaj floroj, karaj, printempaj, inter kiuj potence regas la ruĝaj papavoj kaj blankaj *margeretfloroj*. Serena venteto blovas alportante la odoron de miloj da floroj, kiuj ekmoviĝas, kvazaŭ "jes"-on respondante, kiam mi paŝas inter ili, benante la vivon. Multkoloraj papiloparoj flugas tien kaj alien, de loko al loko—de floro al floro...

Mi haltas kaj ĉirkaŭrigardas. Tiom belega estas ĉio ĉirkaŭ mi!—la floroj sur la ebenaĵo, la kanto de la najtingalo, la rivereto, en kies ondoj banas sin la radioj de la suno kaj la malproksimaj montoj bluaj, malantaŭ kiuj malaperas la blankaj nubetoj... Mi estas emociigata per la beleco de la naturo, de la vivo; mian animon sorĉis la soleco kaj ĝi flugas nun en la songoj de la revo. Ĝi flugas, kiel la koloraj papilioj, kiel la blankaj, facilaj nubetoj... Jes, kiel la blankaj, facilaj nubetoj:—super floraj kampoj, trans la blujn montojn malproksimajn, —super vilaĝoj, urboj, riveroj kaj florantaj regionoj kaj landoj, ĝis kiam ĝi atingas la celon—la valon de Ebro, la regionojn, ebenaĵojn de Aragono kaj Valencio, kie senhalte kisadas la bordojn la fidela "Mare Nostrum", rakontante melankoliajn fabelojn pri iamaj famaj maristoj, murmurante mistike,—konstante...

* * *

Estas belega tago printempa. La posttagmeza suno pentras la tutan ĉirkaŭaĵon orkolora per siaj sunradioj. Ĉio aspektas dimanĉa, solena... Kaj mi staras, sorĉita, revante en tiu ĉi ĉarma, printempa minuto kaj disetendigante la brakojn en sopira ĝemo mi saluton sendas per la facila venteto kaj flugantaj, blankaj nubetoj al miaj gefratoj en la feliĉa lando de "Mare Nostrum"—saluton, kun frata manpremo,—sinceran, koran saluton...

Amikan saluton!...

ERNESTO VANYA.

Rim. Sobota, Ĉeĥoslovakio.

INDA LABORO

Kelkaj entuziasmaj samideanoj kies nomojn ni ne povas diri, tial ke ili malpermesis tion al ni, eldonis la markojn kies kliŝon ni publikigas.

Pri ilia celo nenion ni devas diri. Ĝin sufiĉe komprenos niaj legantoj per la cirkulero, kiun ili sendis al multaj esper-societoj de la tuta mondo, kopiita ĉi sube.

Pri la sukceso de la ideo ni nur rimarkigas ke jam estas ricevitaj petoj por nova eldono.

Kaj pri la filantropa agado de la eldonintaj pioniroj, ne sole ke ili disdonis la markojn po kosta prezo sed ke, cele ke tiu prezo estu plej eble malalta, ili laboradis senpage ĉe la presejo, tiom plenaj de entuziasmo, ke ili estas pretaj fari de-nove la samon.

Ili ricevu koran gratulon de "Esperantismo" kaj "Pacifismo".



Esperantaj Glumarkoj

Grupo de internaciaj amikoj, sendependaj rilate al la malsamaj emoj de sociaj ideologioj, sed de antaŭgardia ideologio; fervoraj entuziasmuloj de nia kara bela kaj klara lingvo "Esperanto" kaj sinceraj amantoj de la vera tutmonda paco, estas eldonintaj (sen enspezo por iu, kompreneble!) kun la efika monhelpo de la samideanoj, kiuj formas la diversajn esperantistajn societojn de Zaragoza (Hispanio), 128.000 glumarkojn por "Esperanto" kaj por Paco, dektrilingve kaj kvarkolore. Tiu-ĉi eldono (128.000) jam estas disdonita inter la zaragoza esperantistaro.

Tiu-ĉi grupo sin nomis "Esperanto kaj Paco" por la interrilatoj kun la tutmonda esperantistaro.

Celante propagandi kiel eble plej vaste la idealojn de Paco kaj Frateco internacia, oni estas volinte modeste alporti sableron al la komuna ago de Paco, eldoninte tiujn glumarkojn.

"E. kaj P." plezure kunsendas al vi kelkajn glumarkojn, kiel specimeno ĉar eble vi, bonvolas ĝin disvastigi inter viaj diversaj fakoj.

Estus por "E. kaj P." granda plezuro ke, la eldonoj de tiuj glumarkoj plimultiĝus, ĉu estante kopiitaj de vi, kaj pro tio reldonitaj (kondiĉe ke, neniu enspezu por si) aŭ ĉu "E. kaj P." prenus sur sin aliajn eldonojn. Laŭ la lasto, "E. kaj P." povus sendi al vi milon aŭ milojn da glumarkoj po 1'60 pesetoj ĉiu milo, antaŭpage, rekomendite kaj sensendpage. Oni estas eldonante aliajn 200.000 glumarkojn litografie.

Se vi ne trovas la tekstojn de via nacia lingvo,

bonvole sendu al "E. kaj P." tradukon en via lingvo de la jenaj tekstoj.

- 1.^a "For la militon!"
- 2.^a Lernu Esperanton!" kaj.
- 3.^a "Lernu Esperanton, la solan praktikan lingvon internacian!"

Kaj tiamaniere "E. kaj P." faros reldendon kun ĉi novaj tekstoj, litografie.

Se vi apartenas al iu gazeto bonvolu publikigi tian deziron.

Informon pri "Esperanto kaj Paco" vi povos ricevi ĉe "Esperanta Laborista Grupo" Plaza San Carlos, 3, pral. dcha. kaj ĉe "Frateco" Roda, 14-16, pral. Zaragoza (Hispanio). Se iu volas mendi glumarkojn, bonvolu sendi la monon al "Frateco" (esperanta societo) por plifaciligi la ricevon.

Esperante esti atentitaj de vi, salutas vin.

ESPERANTO KAJ PACO.

Plezure ni sciigas al ĉiuj geesperantistoj ke, pro la granda sukceso de tiuj glumarkoj pro paco kaj Esperanto, la tuja eldono anstataŭ 200.000 glumarkoj estos 500.000 glumarkoj. Ankaŭ anstataŭ 8 desegnoj kaj dektrilingve ili estos 12 desegnoj kaj dekseslingve.

Ni rimarkigas la donemecon de granda industriisto de Zaragoza, Sro. Castro, arta litografisto, granda entuziasmo de nia bela idealo, kiu al ni donis ĉiujn ajn facilecojn, kiujn ni necesas por tiu ĉi grava eldono, kies preso estos pleja litografika perfekteco.

Izolita esperantisto faras
por nia celo tiom, kiom se
li ne estus Esperantisto.
Li devas, do, esti ano de
iu ajn Esperanta Societo.

HISPANA ESPERANTISTA KONFEDERACIO



Prezidanteco dum 1932-33:

ARAGONA ESPERANTISTA FEDERACIO

Socia ejo: Stro. Roda, num. 14-16, Zaragoza

Aligintaj Federacioj:

Aragona, Astura, Kanaria, Kataluna
kaj Orienthispana

ESPERANTISTOJ!
Disvastigu la helpan
internacian lingvon
ESPERANTO

